



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 5-a de Decembro 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Eldad Salzman, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi.

*La Estraro esprimas siajn profundajn kondolencojn al nia amiko, estrarano, Dror Gaon, je la okazo de forpaso de lia patro.*

*Protokolo de la antaŭa kunsido (7-a de Novembro 2016) – kontrolo pri plenumado*

*Raporto: Ĝenerala voĉdono de UEA – ĉu indas sendi per rapida poŝto? [ps. Dror sendis rapidpoŝte kaj ĝi alvenis ĝustatempe, la ĜD de UEA dankis]*

### **1. Zamenhofa vespero** (Matilda, Jehoŝua) - La dato: 19-a de decembro.

- a) Ĉu lui la pri grandan salonon anstataŭ la regulara kunvena ĉambro? Se ni estos pli ol 20, se ni invitos la loĝantojn de la maljunulejo por spekti la artan programon, - ni bezonas pli grandan lokon. Tali bezonas lokon por sia danco, ktp. Tiuokaze ni pagos pli, sed ni ne pagos la regularan kunven-ĉambron. La diferenco estas ĉ. 800 sikloj. Voĉdono por la salono kun krompago, senkondiĉe: 3 por, 1 kontraŭ, 3 sindetenas. Dua voĉdono por la salono, kondiĉe ke Efrati lasos la loĝantojn viziti nian vesperon: 3 por, 2 kontraŭ, 1 sindetenas – *akceptita!*
- b) Jehoŝua parolos hebree 10 minutojn pri israelaj poŝtmarkoj de Zamenhof kaj E-o, Amri parolos pri asteroidoj kiuj havas la nomojn Zamenhof kaj Esperanto.

### **2. La 18-a Israela Kongreso, 2017, Aŝkelon** (Amri)

- a) Ĉambro-kosto: la amiko de Amri ne sukcesis ion ajn atingi. Nava ricevis proponon por grupa prezo (minimуме 10 ĉambroj) kiu egala al la prezo de Booking.com (860 NIS po persono por du noktoj, inkl VAT kaj matenmanĝojn), sed ili postulas 30% anticipe, kaj ke ni prezentu la kreditkartojn grupe. En Booking.com tiuj kondiĉoj ne ekzistas, kaj eblas nuligi ĝis 3 tagoj antaŭ la alveno, senpune.
- b) Amri rezervis en oktobro 11 ĉambrojn (la maksimumo kiun permesas Booking.com). Poste Nava provis rezervi per Booking.com pliajn dek, sed evidentiĝis, ke la prezo preskaŭ duobliĝis. Ni devos do akcepti iliajn kondiĉojn por la grupa mendo.
- c) Mikaelo Bronŝtejn konfirmis sian alvenon laŭ niaj kondiĉoj. Ankaŭ Edgar, Mara Timermane + kunulo, kaj Heinz, la germano. Ili ankaŭ partoprenos en la antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj.
- ĉ) Reklamado: Amri prezentis "evento-paĝon" en Facebook, kaj promociis ĝin kontraŭ 26.30 NIS - pli ol mil personoj spektis ĝin. Krome informis tra Esperantujo per retlistoj kaj E-grupoj en FB. Informado: Amri aldonis la informon pri la IK al la kalendaro de EVENTOJ, kun ilustraĵo de la afiŝo, kio kromkostis 10 eŭrojn (debetita al ELI-konto ĉe UEA). Anonco: 1/4 paĝa kovrila por la revuo E-o (300 eŭroj) laŭ la antaŭa decido (vd. 3ĉ) – pri la Memorlibro, pri la KD, pri IE kaj pri la lernolibroj de Aleks Kerbel. 2/...



d) Aliĝilo: necesas verki ĝin kaj aperigi en la IK-paĝo en la retejo. Ĉu Jehoŝua jam faris? Jael akceptis mastrumi la aliĝilojn, laŭbezone ankaŭ la kreditkartojn – ĝis la Zamenhofa Vespero. Jehoŝua jam mendis lokojn por la PK en Haifa.

### **3. Memorlibro pri Josi / IE-162** (Amri)

- a) Amri intense laboras, esperas liveri al la presejo ĝis lia forvojaĝo ĵaŭde al konferenco en Vietnamio. Necesas enmeti centojn da etaj korektoj trovitaj dum la provlegado, anstataŭi ĉ. dudek skanitajn artikolojn per pli bonkvalitaj skanĵoj, anstataŭi plurajn fotojn kiujn Judit enmetis senrilate al la enhavo.
- b) Amri esperas ke la dua eldono pretos ĝis la ZV, sed certe ne sukcesos fari ankaŭ IE-162.
- c) Redaktoro por IE – aktive serĉi kun promeso de la decidita rekompenco (1000 NIS/n-ro).
- ĉ) 1/4-paĝa anonco (por la decembra kovrilo): Amri faris malnetaĵon (aldone). Ĉu en ordo? (pri la 18-a IK, pri la Memorlibro, la KD kaj la lernolibroj de A. Kerbel). Ĉu kontakti, kaj kiu kontaktu kun "Lernu" kaj "Duolingo", rilate reklamojn? – *Eran volutiĝas fari tion.*

### **4. Dratverejo** (Jehoŝua)

La novaj loĝantoj petis ripari la necesejon – traktita. Ili petis aldoni (instali) fenestrojn en la balkono, Jehoŝua intencis proponi duonigi la elspezojn, sed neantendite oni informis ke la tuta domo eniris projekton de rekonstruado “פינוי בינוי”. La situacio ŝanĝiĝis, sed la tempo de la komenco de la laboro estas neantaŭvidebla. Propono: ni proponu al la loĝantoj duonigi la elspezojn (ĉ. 2300 sikloj), kaj tiel instali por ilia komforto, samtempe riski la perdon de tiu investo. Voĉdono: 5 por, 1 kontraŭ. *Jehoŝua prezentu la proponon al la luantoj.*

### **5. Projekciilo** (Amri)

Miĥal parolis kun Efrati. Li aprobas ke ni uzu la fiksitan projekciilon. Ni ne povas ricevi ŝlositan ŝrankon por nia projekciilo.

### **6. ELI-retejo** (Dror)

- a) Amri renovigis la pasvorton. Statistika kalkulilo: li informis kaj la ELI-membraron kaj eksterlande pri la statistiko: pli ol 50,000 vizitoj estis dum 4 jaroj. Pli ol 500 vizitoj nur en la lasta monato.
- b) Ni devas ĝisdatigi la IK-paĝon: estas novaj eroj (aliĝilo, informilo).

**La venonta kunsido:** lunde, la 9-an de Januaro 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi